


LA DEKSEPA



Organe Mensuel Espérantiste.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : *France*, 1 franc. — *Etranger*, 1 fr. 50 par an.
Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa ».

Groupe Espérantiste du XVII^e Arrondissement de Paris.

SIÈGE SOCIAL : 179, Boulevard Pereire, Paris.

Ĉiumerkrede, je la naŭa
vespere, okazas amika kun-
veno de nia grupo ĉe la

Tous les Mercredis, à 21
heures, réunions amicales de
notre groupe au

Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris

Téléphone : Wagram 30 - 46

1-a etaĝo. Speciala eniro.
Urba fervojo : stacidomo
Pereire.

1^{er} étage. Entrée particulière.
Métropolitain : station Pe-
reire.

La kongresanoj ĉeestantaj
en Paris antaŭ la kongresa
malfermo estos kore ak-
ceptataj.

Les congressistes qui se-
ront à Paris avant l'ouverture
du congrès, sont cordiale-
ment invités.

Le secrétaire, **ROBERT BOLLACK.**

L'Esperanto à Paris et en France

La prochaine réunion des groupes indépendants aura lieu le Mardi 12 Mai 1914, à 21 heures, au siège des réunions du Groupe Espérantiste Paris-Est, Café de la Mairie, 5, place Armand-Carrel, Paris.



Le Congrès de la Fédération Espérantiste de la Région Parisienne a eu lieu le 29 Mars 1914, à Levallois-Perret.



Le Conseil Municipal de Joinville-le-Pont (Seine) a émis un vœu en faveur de l'introduction de l'Esperanto dans les programmes scolaires.



Le Syndicat d'Initiative de Château-Thierry vient d'édi-ter un livret-guide en Esperanto.



Un groupe espérantiste vient de se fonder à Aumale.



Une fête de propagande espérantiste a eu lieu à La Roche-sur-Yon, en Février dernier.

L'Esperanto à l'étranger


Le congrès national espérantiste finnois aura lieu les 12 et 13 Avril 1914, à Tampere; les congrès nationaux espérantistes britannique, allemand et hongrois auront lieu le 31 Mai à Sheffield, Leipzig et Szeged.



Un cours d'Esperanto s'est ouvert à Pékin; ce cours est suivi par des Chinois, des Français et des Belges.



A Londres, la fête annuelle de la B. E. A. a eu lieu le 7 Février dernier.



Avis très important

Les examens pour l'obtention de l'*Atesto pri Kapableco* et de l'*Atesto pri Supera Lernado* auront lieu pour la région parisienne à la Sorbonne, Faculté des Lettres, Salle V (entrée: 17, rue de la Sorbonne, Paris). *Épreuve écrite*: le 5 Juin 1914, à 20 heures (se munir de ce qui est nécessaire pour écrire); *épreuve orale*, sur convocation spéciale, le 12 Juin 1914.

Dixième Congrès Universel d'Esperanto

Paris — 2-10 Août 1914

Le Congrès aura lieu dans le « Gaumont-Palace », rue Caulaincourt-place Clichy.

La carte du Congrès coûte 15 francs et 25 francs pour les personnes qui s'inscriront après le 1^{er} Juin 1914. La femme et les enfants d'un congressiste paieront par personne 10 francs ou 20 francs après le 1^{er} Juin 1914. Ces derniers congressistes n'auront pas droit aux documents du Congrès.


Les adhésions sont reçues tous les Mercredis soir aux réunions de la « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa », Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.

Dek-Sepanoj aliĝu! Per via tuja aliĝo vi montros vian firman deziron sukcesigi tiun internacian festaron!

Vivu la Deka!!!

La 25-an de Marto 1914 estis 1634 gekongresanoj.





La personeroj de Lambinet

De H. Meilhac kaj Lud. Halévy.

Komedieto en unu akto, ludita ĉe unu el la festoj de « La Dek-Septa ».

(Daŭrigo kaj fino.)

GUSTAVO (*mirigita*). — Vi... volas... ke mi marŝu....

LAMBINET (*kun malpacienco*). — Certe, jes, marŝu... marŝu....

GUSTAVO (*marŝante, aparte*). — Kia stranga akcepto !!

LAMBINET. — Marŝu ĉirkaŭ la tablon. (*Gustavo obeas. Haltigante lin*) Sufiĉas, sufiĉas, necese estas, ke vi marŝu kun konvekso brusto kaj la brakoj rondformaj. Estas grave utile ! ĉar vi marŝas kun balanciĝantaj brakoj.

GUSTAVO. — Vere, miaj brakoj....

LAMBINET. — Mi tre ŝatas, ke oni havu brilantan teniĝon. Kompreneble, iom post iom vi perfektigos. (*Aparte*) Li estas timemŝajna, sed, kiam li havos ĝuste alfaritan livreon sur la dorso.....

GUSTAVO (*aparte*). — S-ro Berluron estis tute prava... estas ŝerculo... li amas petoli.

LAMBINET. — Nu, mi konsentas akcepti vin... sed, nur post provo.

GUSTAVO. — Kiel, post provo ! (*Aparte*) Ankoraŭ nova ŝerco de li !

LAMBINET. — Jes, tiel mi kutimas agi... nur post provo.

GUSTAVO. — Kiel vi kutimas ?

LAMBINET. — Tre certe... ĉu vi pensas, ke vi estas la unua, kiu prezentigas ?... mi akceptis kelkajn, kiuj ŝajnis pli ruzaj ol vi.... Vi estas kutimita kun la deĵoro, mi supozas ?

GUSTAVO. — Kia deĵoro ?

LAMBINET. — Nu, vi tre certe scias, kion vi havas por fari ?

GUSTAVO. — Kion mi havas por fari ? (*Aparte*) Estas neordinara petolaĵo..... La diablo forportu min, se mi ion komprenas en tiu afero !

LAMBINET. — Nu, kompreneble, pri la servado.

GUSTAVO (*aparte*). — Ha! ĉi intencas mistifiki min? Nu, bone; ni kune kunridos... mi, laŭsajne, tre sprite akceptos la aferon.... (*Laŭte kaj kun malica rideto*) Aŭskultu, aŭskultu.

LAMBINET (*aparte*). — Kial li tiel malsprite ridas?

GUSTAVO (*ĉiam malica*). — Mi, ĝis nun, ne konas ankoraŭ la servadon, sed, mi ĝin eklernos.

LAMBINET. — Mi esperas, ke vi ĝin ellernos.

GUSTAVO (*ridante largbuŝe*). — Jes, jes, mi ĝin ellernos.

LAMBINET. — Diru do al mi, kial vi tiel ridas?

GUSTAVO (*aparte*). — Jen stranga aventuro... sed mi lerte eltiros min el la ŝerco. (*Laŭte*) Aŭskultu min... (*li pasas sian brakon sub tiun de Lambinet, kiu tuj frapas sur lian manon. Tute mirigita, li eltiras sian brakon kaj daŭrigas*) Necese estas, ke mi vin informu pri mia karaktero. Ekzistas homoj, kiuj havas unuforman eksteraĵon... mi ne estas tiel.... Mi konsistas el du bone difinitaj partoj.... La unua parto konsistas el supermezura timeco kontraŭ la virinoj; cetero vi mem povos konstati ĝin, kiam mi troviĝos antaŭ via filino.....

LAMBINET. — Kiel?

GUSTAVO. — La dua parto konsistas el nesatigebla deziro, kiam mi troviĝas antaŭ ŝerculo, fariĝi pli ŝercplena ol iu ajn, kaj daŭrigi la petolaĵon ĝis ĝia plej ekstrema grado. Nun, mi pensas, ke vi sufiĉe konas min.

LAMBINET (*eksplozante*). — Kia malspritulo! Kia idioto!

SCENO XII-A

LA SAMAJ, FANĈETO, *venante el la fundo.*

FANĈETO (*al Lambinet*). — Ha, sinjoro, vi estas reveninta! La notario estas en via skriboĉambro; li atendas vin.

LAMBINET (*aldirektante sin al sia skriboĉambro*). — Estas por la edziĝa kontrakto... mi tuj iros. (*Revenante sur la mezon de Fsceno*) Sed, antaŭ ĉio, Fanĉeto...

FANĈETO. — Sinjoro....

LAMBINET (*montrante Gustavon*). — Jen estas la nova servisto.

GUSTAVO (*aparte*). — La petolaĵo daŭrigas.... Des pli bone... des pli bone....

FANĈETO. — Ha! estas li?

LAMBINET (*al Fanceto*). — Vi instruos lin pri la dezirata laboro.

GUSTAVO (*ridegante*). — Jes, Fanceto, vi tuj ekinstruos min pri la afero.

LAMBINET (*furioza*). — Kial, do, vi tiel ridegas?... ĉu vi kutimas paroli pri ĉio ajn, ridegante?

GUSTAVO. — Ne, mi ne ĉiam ridas parolante, sed estas kelkaj okazoj, kiuj devigas min ridi.

LAMBINET (*aparte*). — Kia idioto!... Felice, post ok tagoj, mi povosjeti lin eksteren. (*Ladte kaj montrante Fanceton*) Tiu ĉi fraŭlino estas mia kuiristino.

GUSTAVO. — Tion mi jam supozis.

LAMBINET. — Nun, mi iras al la notario. (*Al Fanceto*) Ha! kiam S-ino Lambinet revenos, vi diros al ŝi, ke ŝi tuj nin rekunigu (*li eliras*).

GUSTAVO (*sekvante lin*). — La notario?... mi bone scias, pro kio ŝi venis (*li ridegas*).

LAMBINET (*furioza*). — Per mil diabloj! ne ridu do ĉi-okaze! (*Aparte*) Kia malspritulo! (*li eliras per la fundo*).

SCENO XIII-A

FANCETO, GUSTAVO.

GUSTAVO (*al si mem*). — Ĉu la ŝerco longe daŭros? Se estas tiel, ni akceptu ĝin spritmaniere! Necese estus, ke ideo elkresku el mia cerbo.

FANCETO (*kiu elprenis servistan antaŭtuko el la ŝranko*). — Prenu, jen estas antaŭtuko.

GUSTAVO. — Antaŭtuko? Kion fari per ĝi?

FANCETO (*superpasante la ligilon de l'antaŭtuko ĉirkaŭ lia kolo*). — Por survesti ĝin, kompreneble. Vi ne povas resti tiel vestita kun blua frako kaj flava vesto.

GUSTAVO. — Ha! estas antaŭtuko por servisto... bone, la ŝerco daŭrigadas.

FANCETO. — Kia ŝerco?

GUSTAVO. — Antaŭtuko por..... Ha! ideo al mi ĵus ekvenas! Reprenu vian antaŭtukon, mi provizos al mi pli belan (*li redonas la antaŭtukon kaj eliras*).

FANCETO. — Kiel, pli belan?

GUSTAVO (*revenante*). — Jes, jes.... Malsupre, mi rimarkis vendiston de eluzitaj vestoj. Ĉe li, mi trovos, kien mi be-

zonas, estos multe pli amuza ol tiu antaŭtuko. (*Aparte*) Ha! bopatro mia, vi bezonas serviston kaj eĉ elplaĉantan! (*Laŭte*) Nenion diru, nenion diru; mi tuj iros ĉe la vestvendiston.

SCENO XIV-A

FANĈETO (*sola*).

Estos multe pli amuza ol la antaŭtuko! Li iris ĉe la vestvendiston! Kia junulo estas tiu ĉi! (*Revenas de la fundo S-ino Lambinet, Josefo kaj Margareto*) Ha! jen la sinjorino, fraŭlino kaj la estonta edzo. (*Margareto apogas sin sur la brakon de Josefo. Ili malrapide malsupreniras sur la scenon, S-ino Lambinet sekvas ilin kaj ilin observas; ŝi sajnas tre emociigita.*)

S-ino LAMBINET (*aparte*). — Mia filino feliĉa! Estis la revo de mia tuta vivo!

JOSEFO (*aparte*). — Ni venas de ĉe la onklino « Buchon ». Tie okazis stranga interparolado!

FANĈETO (*direktante sin al S-ino Lambinet*). — Sinjorino...

S-ino LAMBINET. — Kio estas?

FANĈETO. — La sinjoro estas en sia skriboĉambro, kun la notario... oni atendas vin....

S-ino LAMBINET. — Bone, mi tuj iros.

FANĈETO (*al S-ino Lambinet*). — Ha! Sinjorino, la nova servisto estas alveninta. Li vere estas stultulo.

S-ino LAMBINET (*kiu pli kaj pli emociigas, rigardas kortuŝite Josefon kaj Margareton*). — Lasu nin solaj, Fanĉeto, lasu nin.

SCENO XV-A

MARGARETO, S-INO LAMBINET, JOSEFO.

S-ino LAMBINET (*al Josefo*). — Ĉu vi permesas, ke mi diru kelkajn vortojn al mia filino?

JOSEFO. — Tre volonte, Sinjorino (*li flankeniras, ekvidas flaman balailon, kiu estis forgesita sur seĝo, prenas ĝin kaj kielmaŝine senpolvigas la meblojn, dum S-ino Lambinet parolas al Margareto*).

S-ino LAMBINET (*al Margareto*). — Filino mia, estas nur permesate al li, interparoli kun ĉi pri sensignifaj aferoj.... Se, tamen, li deŝankigus de tiu ĉi tenigado, imponita de la bonmanieroj, ĉi tuj sonorus por venigi la serviston kaj ĉi al li dirus: « Mia patrino forgesis sian naztukon, alportu ĝin al

ŝi ». Elirante de tie ĉi, nerimarkite, mi intence forgesos mian nazitukon sur tiu ĉi tablo.... Ci komprenas?... Ĝis baldaŭ, infano mia (*ŝi perforte kisas sin kaj ekploregas*). Ha! nur patrinoj povas min kompreni! (*ŝi deturniĝas kaj ekvidas Josefon, kiu starante sur seĝo, trankvile senpolvigas la kadron de enkadraĵo*) Sinjoro...

JOSEFO (*malsuprenirante de la seĝo kaj metante la plum-balailon sub la brakon*). — Sinjorino...

S-INO LAMBINET. — Mi vin ambaŭ lasas (*ŝi ekeliras, sed revenas tuj. — aparte*) Ha! mi forgesis postlasi mian nazitukon (*ŝi demetas ĝin, tre videble, meze de la tablo, sub la rigardoj de Josefo*) ... ne rimarkite.... (*Al Josefo*) Sinjoro, (*ŝi eliras per la dekstra flanko*).

SCENO XVI-A

MARGARETO, JOSEFO.

JOSEFO (*aparte*). — La patro estas frenezulo, la patrino ankaŭ... la fraŭlino, eble, posedas iom da prudento kaj mi tuj ekprofitos la momenton, kiam ni estas solaj por diri al ŝi, kiu mi estas kaj pro kio mi venis. (*Laŭte*) Fraŭlino...

MARGARETO (*konfuŝita kaj malantaŭenpaŝante kelkajn paŝojn*). — Sinjoro...

JOSEFO (*marŝante antaŭen*). — Fraŭlino, mi vin petas, aŭskultu min.

MARGARETO (*ĉiam regresante*). — Mi aŭskultas vin, Sinjoro.

JOSEFO. — Mi havas konfeson por fari al vi.

MARGARETO. — Ne diru ĝin al mi, sinjoro, ne diru.

JOSEFO. — Konfeson, iom riskita....

MARGARETO (*terurigita*). — Iom riskita! Estas malpermesate al mi, aŭdi ion riskitan, Sinjoro; panjo malpermesis ĝin.

JOSEFO. — Sed, fraŭlino....

MARGARETO (*paŝante dekstren*). — Lasu min, Sinjoro, lasu min.

JOSEFO (*aparte*). — Ho! ho! vere ŝi estas netolerebla, la fraŭlineto, kaj vole nevole..... (*laŭte*) Estas absolute necese, ke vi min aŭdu, fraŭlino.

MARGARETO (*terurigita, aparte*). — Li ekkoleras.... (*ŝi aldirektas sin al la sonorilo*) Ne alproksimiĝu, Sinjoro, ne alproksimiĝu!

JOSEFO. — Mi ne estas tiu, kiun vi atendis.

MARGARETO. — Ha! tion mi bone vidas, Sinjoro. (*Ŝi tiras la sonorilon.* — *Gustavo eniras sur la fundo. Li estas vestita per granda livreco de ĉambristo, de malnova epoko, frako tre granda, kiu flirtante, frapas liajn kalkanumojn, ĉapelo de ĉasisto kun kokplumoj.*)

SCENO XVII-A

LA SAMAJ, GUSTAVO.

GUSTAVO. — Mi venas! mi venas! (*Aparte*) Almenaŭ mi estas vestita por ludi mian rolon.

JOSEFO (*aparte*). — Maskulo!

GUSTAVO (*ekvidante Margareton kaj tuj farigante timema*). — Ha! estas ŝi!!

MARGARETO (*kiu, kun la naztuko de sia patrino en la mano, ĉiam observas Josefon, ne rigardante Gustavon, — al Gustavo*). — Portu tiun naztukon al mia patrino.

GUSTAVO (*iom rekonsciigante*). — Porti tiun naztukon al via patrino... tro facile estas... Jetu tiun naztukon tra la fenestro, poste, ordonu al mi ĝin sekvi kaj mi tuj sekvos ĝin.

MARGARETO (*aparte*). — Strange vestita li estas.

JOSEFO (*aparte*). — Frenezulo plie en la domo!

GUSTAVO. — Ha! fraŭlino, kiel bela vi estas... kaj kiel mi vin amas! (*li surgenuas antaŭ ŝi*).

MARGARETO (*eljetante krion*). — Ha! panjo, la servisto ĵus faris al mi amesprimon!... Panjo! panjo! (*Lambinet venas de la fundo, S-ino Lambinet kaj Fanceto venas de la dekstra flanko*).

SCENO XVII-A

LA SAMAJ, LAMBINET, S-INO LAMBINET, FANCETO,
poste BERLURON.

LAMBINET (*vidante Gustavon ĉe la piedoj de Margareto kaj piedfrapante lin*). — Rikoltu tion!

GUSTAVO (*sin relevante*). — Ha!

JOSEFO. — Tre bone!

MARGARETO (*enfalante en la brakojn de sia patrino*). — Panjo!

S-INO LAMBINET. — Mia filino!

FANCETO. — Kio estas ĉio tio?

GUSTAVO (*kun indeco al Lambinet*). — Ĝercon mi scias akcepti... la pruvo de tio estas, ke mi survestis tiun vestaĉaron, sed, tuŝante la piedfrapon... ne, ĝi supermezuras mian paciencon, ne estas plu spriteco, sed arlekenaĵo, kara bopatro!

LAMBINET. — Bopatro!

ĈIUJ, ESCEPTE JOSEFO. — Bopatro!

JOSEFO (*kun brilo irante al Gustavo*). — Ha! nun mi komprenas... (*li saltas al Gustavo kaj eltirante al li la livreon*) Donu ĝin al mi! (*Al Lambinet*) La servisto, estas mi... kaj li — via bofilo.

LAMBINET. — Kion vi diras?

JOSEFO. — Mi pretendas, ke estas eraro... mi venis ĉi tien por fariĝi via servisto, kaj li por fariĝi via bofilo (*li pasas apud Fanĉeto*).

LAMBINET (*mirigita*). — Ĉu estas eble?

MARGARETO (*ĵetante sin en la brakojn de sia patrino*). Ha! panjo, mi, kiu jam ekamis la serviston!

(*Berluron eniras de la fundo.*)

BERLURON — Nu, ĉu oni vespermangos aŭ ne? Mi devas rapidi.

LAMBINET. — Certe oni vespermangos, certe; sed unue respondu!... (*montrante Gustavon kaj Josefon*) Kiu el tiuj du viroj estas mia bofilo aŭ mia servisto?

JOSEFO kaj GUSTAVO. — Sed, ĉar.....

LAMBINET (*kriegante*). — Ne influu lian decidon! (*Al Berluron*) Nu, parolu!...

S-ino LAMBINET (*al Berluron, pasante apud Gustavo*). — Ha! parolu; pensu, ke de via decido dependos la feliĉo de mia filino!

ĈIUJ. — Parolu!... parolu!...

BERLURON (*konfuzegita*). — Vi malordigas miajn pensojn... mi ne plu scias, eĉ ĉu mi vivas.... Ha! (*montrante Gustavon*) jen la vera bofilo, kaj (*montrante Josefon*) jen la servisto (*li alpaŝas dekstren*).

LAMBINET. — Tion, mi ĉiam suspektis.... Cetere, nenio pli facila ol fliki tiun aferon. (*Al sia filino*) Margareto, se ci jam ekamis tiun, necese estas, ke ci haltigu cian fervoron kaj ke ci tuj enamigu tiun ĉi.

MARGARETO (*post kiam ŝia patrino lokis sin apud Gustavo*). — Mi ekprovos, paĉjo.

GUSTAVO (*al Margareto*). — Ha! fratilino!

LAMBINET (*al Margareto*). — Brave! brave! ĉio arangigas... (*Frapante sur la ŝultron de Gustavo*) Vi estas taria malbonegan serviston.

JOSEFO. — Nenia dubo pri tio.

LAMBINET (*al Gustavo*). — Kontraŭe vi farigos tute konvena bofilo.

(Fino)

Tradukis HENRI DE COPPET.

Retrouvé grâce à l'Espéranto.

Notre compatriote, M. Gallet, brigadier de police, attaché au commissariat de Neuilly, était depuis trente ans sans nouvelles de son frère, qui avait quitté la France après son service militaire.

En désespoir de cause, il vint dernièrement conter sa peine à M. Bernard, secrétaire du Groupe Espérantiste de Saint-Denis. Fort obligeamment, celui-ci écrivit à tous les correspondants de sa société, et eut, ces jours derniers, la joie d'apprendre par une lettre d'un espérantiste de Brisbane (Australie) que le frère de M. Gallet était encore en vie.

En même temps, M. Gallet lui-même recevait une lettre de son frère qui lui disait tout son bonheur de l'avoir retrouvé et lui annonçait qu'il cultivait, avec ses cinq enfants, la canne à sucre, à Fig-Tree-Creek, non loin de Brisbane.

Avizo. — La Rédaction de *La Dek-Sepa* désire acheter les Numéros suivants : N° 2 (Janvier 1911) ; N° 7 (Jan. 1911) ; N° 12 (Janvier 1912) ; N° 13 (Février 1912) ; N° 14 (Mars 1912) ; N° 24 (Mars 1913).

OUVRAGES de M. Henri de Coppet.

En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».

- L'Espéranto appris sans maître en 15 leçons fr. 1.50
Recueil de phrases, édition Française-Espéranto, plus de
2800 phrases de la vie usuelle fr. 1.80
L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof,
édition pour ténor ou soprano fr. 1.50

